



KORVO KAJ VULPO

Magistro korv' sur arbo altsidanta,
En sia bek' fromaĝon portis.
Magistro vulpo al odor' flaranta,
Tiele proksimume vortis:
« Saluton korva moŝto mia.
Senfine vi aspektas bela kaj gracia!
Se plie, via voĉo trilas
Agrable kiel plumoj brilas,
Vi estas de 1' arbaro la feniksa gasto. »
Je tiuj vortoj ekĝojegas korvo vanta;
Por montri voĉon sen prokrasto
Malfermas larĝan bekon, jen rabaĵ' falanta.
La vulpo kaptas ĝin kaj diras gi: « Kunulo,
Nu eksciu, ke flatulo
De la kredema aŭskultant' profitas.
Ĉi tiu lecion', fromaĝon ja meritas. »
La korvo honta kaj konfuza
Malfruis tro por ĵuri, ke ĝi estos ruza.

Libro 1,2

Jean de la Fontaine
8 juil 1621 / 13 avr 1695

